

# Biblioteko Lorenz en Ĉeĥio

*El Ĉeĥio ni ricevis la ĉi-suban korespondadon, kiu certe interesas nin, brazilanojn. La leteron al ni transdonis la sekretario de Portalo Bona Volo, Maria Aparecida da Silva, al ki uni kore dankas.*

Karaj amikoj,

La 8an de julio okazis grava evento en la komunumo Vrďy (Ĉeĥio), al kiu nun administracie apartenas Zbyslav, la naskiĝvilaĝo de František Vladimír Lorenc (ĉeĥa formo de F. V. Lorenz).

La loka biblioteko portas ekde la 1a julio oficialan nomon "Knihovna Františka Vladimíra Lorence Vrďy" (Biblioteko Francisko Valdomiro Lorenz Vrďy) kaj dimanĉe la 8an de julio okazis senvualigo de la memortabulo pri F. V. Lorenz sur ĝia ekstera muro, produktita fare de la skulptisto kaj esperantisto Zdeněk Myslivec. Le publiko konsistis el proksimume 100 personoj. El Brazilo salutis la ĉeestantojn la ĉeĥa ĝenerala konsulo el Sao Paŭlo, s-ino Pavla Havrlíková.

Post la enkondukaj vortoj de la urbestro Antonín Šindelář, la bibliotekistino Pavla Kobelová prezentis honorajn gastojn kaj skizis la programon de la posttagmezo. Sekvis prelego de Petro Chrdle pri la vivo kaj verko de F. V. Lorenz kun legitaj fragmentoj el la libro pri Zamenhof (estis cititaj Lorenz mem, el sia letero al fratino, lia amiko, kaj s-ino Novinski, eksa estro el la Muzeo de

enmigrintoj en Dom Feliciano), Pavla Dvořáková prezentis sian mur-eksponzon pri F. V. Lorenz, kiu restos en la koridoro de la biblioteko. Post salutvortoj de sinjorino Havrlíková, prezidantinoj de Ĉeĥa Esperanto-Asocio kaj Asocio de handikapitaj esperantistoj, oni menciis skribajn salutojn (inter ili ankaŭ la viajn, sed ankaŭ de la pranepo de F. V. Lorenz, la ĉeĥa honora konsulo en Porto Alegre). Ĉiuj ĉi, kun la tradukoj, estis en tablo por rigardi kaj restos konsulteblaj en la biblioteko.

Sekvis la propra senvualigo de la memortabulo fare de la konsulino el Sao Paŭlo kaj urbestro de Vrďy, la tosto kaj refreŝiĝo, dume en prelegĉambro estis ripete projekciita ĉeĥe dublita 14-minuta brazila filmo pri Lorenz, kaj oni povis ankaŭ konatiĝi kun la libroj de la eldonejo KAVA-PECH. Plej granda intereso estis kompreneble pri la libro de Vlastimil Novobilský, ne nur pri la ĉeĥa versio, sed vendiĝis eĉ kelkaj en Esperanto. Bedaŭrinde ĝia aŭtoro ne povis ĉeesti pro serioza malsano.

Post la priskribita riĉa programo oni busveturigis la partoprenantojn al la

*(Daŭrigota en la paĝo 22)*

“Oni vendas: bebajn ŝuetojn neniam uzitajn.” (Hemingway)

“Homo en Monte Carlo iras al hazardludejo, gajnas unu milionon, revenas hejmen kaj sin mortigas.” (Ĉekov)

“Tuta vivo antaŭ li. La pafo alvenis de malantaŭe.” (Cintia Moscovich)

Minirakontoj povas esti profunde poeziecaj:

“Mi elektis pasion. Nun mi estas malriĉa.” (K. Whitlock)


“Mi ankoraŭ preparas kafon por du personoj.” (Z. Nelson)

“Mi demandis. Ili respondis. Mi skribis.” (S. Junger)

Verki bonan minirakonton estas defio al fantazio, al trafa vortouzado. Ĝi devas kaŭzi surprizon, skui la leganton, stimuli la menson de la leganto. La leganto estas alvokata kompletigi la historion, kiel kunaŭtoro.

Ĉu vi emas provi?

(Ĉi tiu teksto estas resumo de prelego farita en la 53-a Brazila Kongreso de Esperanto, en Kuritibo, ŝtato Paraná.)



## Daŭrigo de la pago 18 (Eŭreka: Fotono)

etan tenisan pilkon. Kaj estas facile imagi unu ondon. Sed kiel eblas io esti samtempe unu ondo kaj unu partiklo? La solan respondon kiun la fizikisto havas estas: ne provu imagi tiajn aferojn – nur vidu la rezultojn de la eksperimentoj kaj komparu kun la ekvacioj de la teoriistoj kaj vidu vi mem ke devas esti vero.

---

A. Einstein, Annalen der Physik, 17, 132 (1905)

## Daŭrigo de la pago 19 (Biblioteko Lorenz)

proksima naskiĝvilaĝo de Lorenz, Zbyslav, kie oni vizitis la lokan preĝejon, en kiu estis Lorenz baptita, la iaman lernejon, kie li komencis edukiĝi kaj deekstere ankaŭ lian naskiĝdomon. La domo ankoraŭ staras, estas en privata posedaĵo, bedaŭrinde ne plu loĝata kaj en preskaŭ katastrofa stato.

Petr Chrdle, KAVA-PECH